

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
marto 2007

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

La rakonto de la kalumeto senfuma

Kvankam ĉi tiu numero de La Kalumeto plenas je informoj pri diversaj lingvoj, kaj kulturoj, estas gravaj temoj kiu restas netraktitaj: la rolo de PIP rilate je la komunikado inter indiĝenoj diverslingvaj, la protektado de indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj, kaj la rolo de Esperanto kaj PIP en la plenumado de tiuj celoj.

PIP povos kontribui al la plenumado de la celoj, sed nur kiam ĝi havos pli da anoj aktivaj. Atendas nin grava kaj granda laboro. PIP bezonas plurspecajn, plurkabalajn homojn, homojn al kiuj gravas la fakto ke indiĝenaj lingvoj rapide malaperas. Sed kiam ni ekscias ke la indiĝenaj lingvoj de Aŭstralio antaŭe estis 250 kaj nun estas 18, ĉu tiu fakto vere gravas?

La nombroj mem ne gravas; la homa perdo gravegas. Kiam lingvo mortas, kulturo mortas. Defendo de indiĝenaj lingvoj estas defendo de homaj rajtoj, ĝi estas defendo de intima rilato kun naturo, de gravaj, specifaj, naturaj konoj, de kulturoj, de nia homa pasinteco.

Esperanto povos ebligi ke personoj el diversaj indiĝenaj kulturoj interkontaktu sin per la Interreto; tiuj personoj ofte suferas pro la samaj problemoj: terenoperdo, netaŭgaj rilatoj kun apudaj kulturoj, senidenteco, misuzado de alkoholo kaj narkotaĵoj, kulturoperdo, lingvoperdo... problemoj kiuj povas mistordi la homan vivon.. Do, ĉu estas kunlaborinde ebligi ke indiĝenoj tra la mondo havu la okazon lerni Esperanton kaj uzu ĝin por kontakti aliajn personojn, cele je kunlernado, kuninstruado, kaj kunĝuado? Se vi opinias ke jes, bonvole kontaktu na (S-ro) Erik Felker / 414 E..Cedar Ave. / Burbank, CA / USA, aŭ ejfelker@dslextre.me.com.

Travivaĵoj ĉe misieja lernejo en Kenjo

“Ofta praktiko por certigi ke lernantoj daŭre premu unu al la alia [pri lingvaj aferoj] estis devigi ke lernanto kiuj uzis lingvon krom la angla portu botonon. Kelkfoje ĝi surportis anglalingvan frazon, ekzemple: “Mi estas stultulo. Oni trovis min dum mi parolis mian gepatran lingvon”

“Retrorigardante, mi povas vidi ke tiu ĉi praktiko komencis la detruon de nia

memfido.”

Wangari Maathaikaj

Gajnintino de la Nobela Premio por Paco

Multlingva centro en Aŭstralio

En la aŭstralia urbo Albury

/Ŭodonga

, Tiuj Kiuj Interesiĝis Pri Indiĝenaj Lingvoj Kunsidis En Novembro 2006. Ili Diskutis Kiel Indiĝenoj Reloĝitaj El Diversaj Lokoj Al La Urbo Povos Daŭrigi Siajn Lingvojn. Kunvenofine, La Partoprenintoj Decidis Starigi Lingvocentron Ne Por Unu Lingvo Aŭ Lingvaro, Kiel Kutime, Sed Por La Diversaj Lingvoj Parolataj En Albury /Ŭodonga . La partoprenontoj en la centro povos religi sin kun siaj indiĝenaj lingvoj kaj respektu ekkoni la lokajn indiĝenajn lingvojn.

Lingva triumfo en Sudafriko

La sudafrika, neregistrita organizo “Translate.org.za” gajnis premion por la tradukado de komputera softvaro kaj klavaroj por la oficialaj lingvoj de Sudafriko. Inter tiuj lingvoj troviĝis la sesota, setŝana, citonga, isindebla, kaj venda. La angla kaj la afrikansa ankaŭ estas oficialaj en Sudafriko.

Antaŭe, pro manko de kromsignoj necesaj por tiuj lingvoj kaj similaj problemoj, oni ne povis ĝuste skribi ilin komputere.

La fondinto kaj ĉefrolanto de Translate.org.za estas s-ro Dwayne Bailey, sudafrikano..

Interesa aspekto de la laboro de la neregistrita organizo estas ke pluraj el la ses lingvoj por kiuj nun ekzistas softvaro kaj klavaroj estas parolataj en aliaj afrikaj landoj. Ĉu ĉi tiu lingva evoluo do havos signifon ne nur sudafrike, sed ankaŭ transafrike?

Noto: Simila projekto, farita de

WordForge

Foundation nun okazas por la kamboĝa.

Lingvoj kaj la Afrika Unio

Ekstraktoj el Lingva Agadoplano por Afriko, farita de Organizo de Afrika Unio (nun Afrika Unio) Adis-Ababo, 1968. (La agadplano restas senŝanga.)

El la “Rezolucioj”:

“Agnoskante ke ĉiu sendependa ŝtato rajtas evolui lingvopolitikon kiu respegulas agrikulturajn kaj socioekonomiajn realojn de sia lando kaj kiu akordas aŭ multe harmonias kun la bezonoj kaj aspiroj de ĝia loĝantaro;...

Konvinkitaj ke la adopto kaj praktika antaŭenigo de afrikaj lingvoj kiel la oficialaj lingvoj de la ŝtato certe havos grandajn avantaĝojn compare kun la uzado de neindiĝenaj lingvoj dum la demokratecigo de la formala edukada procezo kaj partoprenigado de la afrikaj popoloj je la aferoj politikaj, kulturaj, kaj ekonomiaj de ilia lando.

Oni scias ke analfabateco estas obstaklo je la ekonomia, kultura, kaj socia evoluo de afrikaj landoj, kaj ke amasalfabatecaj kampajnoj ne povas sukcesi sen la uzado de indiĝenaj, afrikaj lingvoj.

El “La Lingvoplano”:

Adagprogramo:

(c) Regionoskale, la adopto de lingvoj multageneracie uzebla, regionaj, kaj indiĝenaj kiel oficialaj aŭ vicoficialaj lingvoj; (d) Landoskale, ĉiu Membroŝtato de OAU /AU nepre formulu necese, primare, kaj kun minimuma prokrasto, lingvopolitikon kiu centrigas, por soci-ekonomia evoluo, indiĝenajn lingvon aŭ indiĝenajn lingvojn kiuj estas multageneracie uzeblaj.

Lingva enkonduko: la svahila

La svahila funkcias kiel interregiona lingvo en okcidenta Afriko kaj havas interlingvan bazon; ĝi estas kunmetaĵo el bantu gramatiko kaj araba kaj persa leksiko. (La vorto “ŝahili” arabe signifas “marbordo”.) La svahila ankaŭ enhavas vortojn el la angla, la germana, kaj la portugala, ĉefe pro tio ke la lingvo travivis koloniajn periodojn. La nuna svahilo baziĝas je la dialekto de Zanzibaro, la centro de kulturo kaj komerco dum la koloniaj periodoj

En Afriko, oni parolas la svahilan en Tanzanio, Ugando, Ruando, Burundio, Centrafrika Respubliko, kaj Mozambiko, kvankam en tiuj landoj, aliaj lingvoj ankaw estas parolataj. Pluraj landoj aŭ insuloj en la Oceano Hindia ankaŭ konas la svahilan pro komercaj kaj kulturaj interrilatoj.

Havajaj Ĉantoj

Ĉanto por movo de arbotrunkoj por la farado de kanuoj aŭ de kultofiguroj por temploj:

I Ku Maŭ Maŭ—Kune Ekstaru

Verkita de David Malo, havaja politikisto, pastoro, kaj edukisto.

Laborestro: Kune ekstaru.

Laborantoj: Staru interspace.

Laborestro: Kune staru

sub la grandaj arboj,

trenu tutforte.

Laborantoj: Staru interspace.

Laborestro: Ekstaru interarbe.

Laborantoj: Staru interspace kaj tiru.

Staru interspace kaj trenu.

Trenu branĉojn kaj ĉion.

Tiru nun!

Ekstaru.

Laŭdoĉanto por insulestro de Maui, Havajo, verkita ĉ. 1886. La formala nomo de la insulestro estis Kamalalaŭala.

El angla traduko de Mary Puku'i.

Kama rifuzis postlasi sian insulon.

Tio ĉi estis la tereno retenita de Kama.

La filo, Kama, la plej altrange naskita,

La filo, Kama, kiu regas.

Liajn malamikojn li mortigas malsuprenkaptorde,

Li kavigas ilin.

Li prezentas ilin oferocele al siaj dioj.

Li senigas la insulon je malamikoj ĝis kiam neniu el ili plu ekzistas.

Li flankenrulas ilin kiel ŝtonojn.

Kiel li tiras siajn fiŝretojn, li tiras ilin al si.

Al sia templo, Nu-olani-o-La'a,

Konstruita de Keaŭe, la plej sankta.

Li kiu regis kaj konkeris la insulon,

Lia potenco leviĝis montosupre.

Kama estas la potenca posteulo de Kanaloa.

Sendu viajn kunlabordeklarojn, informopetojn, sugestojn, viajn laŭdojn kaj mallaŭdojn al:

Erik Felker

414 E. Cedar Ave., Apt. 11

Burbank, CA 91501

USA

aŭ sendu mesaĝon al: ejfelker@dslextreme.com